

Esperanto kaj Interlingua, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 712, 1977.06.01 & 03 & 04

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ni daŭrigas nian legadon de resumo de 170-paĝa eseo aperonta en la kolekto Studoj de Kultura Centro Esperantista sub la titolo 'Esperanto aŭ Interlingua? Faktoj kaj teorioj kontraŭ mitoj kaj antaŭjuĝoj'. La resumon, kiun ni legas, mem faris la aŭtoro Edo Bernasconi.

A.- Jen kion Edo Bernasconi diras pri la planlingvoj konkurencaj al Esperanto. Ni citas:

Cl.- Antaŭ Esperanto nur unu planlingvo akiris certan renomon. Temas pri la lingvo Volapük, kiun aŭtoris la badena pastro Johann Martin Schleyer, 1879. Temis pri lingvo relative malfacila, sed tio, kio ne permesis longan vivon al la komunumoj, kolektivoj, kiuj konsentis ĝin utiligi, estis la aŭtokrateco de la aŭtoro. Enhistoriigo de la lingvo, pro tiu individua aŭtokrateco, ne estis ebla. Fine, meze de lingvaj disputoj kaj personaj kvereloj, la movado por Volapük disfalis baldaŭ: en 1894 la volapükistoj jam estis nur manpleno.

A.- Esperanto naskiĝis en 1887, sed ĝia sukceso venis nur en 1900. Inter 1899 kaj 1902 naskiĝis kelkaj lingvoprojektoj, kies celo estis la senpera komprenebleco per la sklava imito de novlatinaj lingvomodeloj. Ni nomos tiujn projektojn lingvoj novlatinoidaj.

Cl.- En 1908 franca matematikisto kaj filozofo proponis la projekton Ido, kiu kaŭzis skismon inter la esperantistoj. Ido iom post iom malaperis: hodiaŭ rezistas nur manpleno el idistoj, ĉefe en Svislando, Britio kaj Svedio.

A.- Iom pli poste estis la momento de la florado de novlatinidaj lingvoprojektoj. En 1921 la balta matematik-profesoro Edgar von Wahl publikigis sian Occidental. Occidental, tre simila al nov-latina lingvo, sukcesis altiri kelkajn adeptojn, ĉefe idistojn, sed nuntempe ili preskaŭ malaperis.

Cl.- Fine, en 1951, grupo el filologoj sub la gvido de Alexander Gode eldonis lingvoprojekton tipe novlatinoidan, Interlingua, pri kiu ni parolos pli detale en venontaj elsendoj. Tiu projekto ankoraŭ ekzistas, kvankam mi dubas, ke ĝi havas pli da anoj ol Ido havas. Tamen ili estas tre aktivaj, kaj ili obstine opozicias al Esperanto, tamen havante pri ĝi ofte nur tre resumajn konojn.

A.- Planita lingvo, kiel jam dirite, devas esti juĝata laŭ sia celo. Esperanto estas lingvo, kiu malmulte similas al Interlingua, ĉar ĝiaj celoj estas malsamaj.

Cl.- Esperanto estas lingvo, kiu fontas el la skolo nomata aŭtonomisma, kiel ankaŭ Volapük kaj Ido. La unuaj teoriaj studoj pri tiu tendenco aperis ĉirkaŭ 1890 fare de Zamenhof mem, la iniciinto de Esperanto. Interlingua fontas el la novlatinoida skolo, kiel ankaŭ la menciita Occidental. La unuaj teoriaj studoj, de Liptay, estas de 1890. Do ambaŭ skoloj estas proksimume samtempaj, kaj ekzistas neniu moderneco de Interlingua rilate Esperanton, almenaŭ koncerne la konstru-principojn.

A.- La celo de Esperanto kaj de la aŭtonomisma skolo estas la konstruo de lingvo, kiu ne dependas de jam ekzistantaj lingvoj, sed kies gramatiko kaj sintakso estu lerneblaj sen referi sin al ekzemple ĝermanaj aŭ novlatinaj lingvoj. Por la anoj de novlatinoidismo, vere estas la kontraŭo : lingvo planita devas absolute simili la novlatinan lingvogrupon, kaj ĝi devas esti

senpere komprenebla je simpla senvortara lego al ĉiu homo, kiu jam scias unu aŭ du nov-latinajn lingvojn.

Cl.- Estas klare, ke la eksplico de tiu komplete malsama baza sinteno troviĝas en baze malsama lingvofilozofio. Se la lingvofilozofio estas malsama, ankaŭ la strategioj kaj teknikoj por konstrui lingvon estos malsamaj. Do ne la rezultojn, la lingvojn ni komparu, sed unue la filozofion, kiu troviĝas je la bazo. Se ni konsentos kun la filozofio de Esperanto, la lingvo Esperanto estos ĝia konsekvenco logika. Se ni konsentos kun la filozofio de Interlingua, Interlingua mem estos la logika konsekvenco. Nur poste ni povos analizi la lingvojn : ne komparante unu la alian - ĉar la laborpremisoj estis tute aliaj - sed ekzamenante, ĉu la lingvostrukturoj mem kongruas kun siaj filozofiaj premisoj, aŭ ĉu ekzistas misakordiĝoj.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos la prezentadon de la kompara studo 'Esperanto aŭ Interlingua' de Edo Bernasconi. Prelegis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*